# *Prezentita nova libro pri kubaj kontra?teroristoj malliberigitaj en Usono.*



René González, heroo de la kuba respubliko, partoprenis la prezenton de nova libro kies titolo estas *Portretro de foresto*, kiu detaligas intense la realon suferitan de la kvin kubaj kontra?teroristoj kaj ties familianoj.
Dum la kultura evento por prezenti la libron ?eestis Abel Prieto, asesoranto de la kuba prezidento Raúl Castro.
Pri la libro René esprimis la jenon: "Mi konsideras ke la sorto de tiu ?i libro dependas de ni, samkiel la sorto de ?iuj libroj pri la ka?zo de La Kvin"; li anka? emfazis la bezonon pensi pri organizaj formoj ?iam diversaj okaze de la prezento de tiu ?i libro, speciale, pensante pri tio ke la historio de La Kvin kubanoj, la vero pri ili, atingu ?iujn personojn ne sciantajn pri ili, kaj precipe la usonan popolon.
Fernando González, anka? heroo de la kuba respubliko kaj vicprezidanto de la kuba instituto de amikeco al la popoloj (ICAP), rekonis la strebojn de la kubaj ?urnalistoj kaj verkistoj de la libro: Nyliam Vázquez kaj Oliver Zamora, kaj elstarigis la faktón ke generacio de gejunuloj dedi?u du jarojn de sia profesia vivo al esplorado pri temoj ne nur ?urnalismaj, sed anka? homaj, solidaraj kaj fratecaj lige al la batalo por liberigo de La Kvin.
Fernando skribis tekston dum la malferma ceremio esprimante ke tiu ?i libro "estas kontribuo grava al la konstanta batalo por senmaskigi tiun silento-konspiradon kaj trafi, kun la vero (…) ?iujn meritindulojn kiuj

?is nun estis senigitaj je la rajto koni la faktojn kaj la kuntekston de la kazo.”

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/35784-prezentita-nova-libro-pri-kubaj-kontrauteroristoj-malliberigitaj-en-usono

**Radio Habana Cuba**